



# TEJO tutmonde!

numero 4.1984

julio/augusto 1984



Estimataj legantoj,

sendube (?) vi demandas vin, kial vi ricevas ĉi tiun numeron de TT kun almenaŭ du monatoj da malfruo. La klarigo estas jena: unue, al la redaktoro mankis tempo kaj due, la redaktoron interesis scii, ĉu la legantoj, aŭ almenaŭ la funkciuloj de TEJO, sufiĉe interesigas pri TT, ke ili enketus, se okazus granda prokrasto. Bedaŭrinde, la eksperimento montris, ke preskaŭ neniu interesigas pri TT, kaj ke mankas sufiĉaj kontribuoj por ke TT daŭre aperu en ĝia nuna formato kaj ofteco. Pro tio - kaj aliaj kaŭzoj - mi ne povas plu malŝpare donaci miajn tempon, laboron, paperon, ktp. al ĉi tiu projekto. Mi ankoraŭ kredas ke io ĉi tia estas bezonata por zorgi la interesojn de la ekstereŭropaj anoj de TEJO, sed se vi kaj/aŭ la gvidantoj de TEJO volas ke TT aperu estontece, devos esti sub la gvido de alia, espereble pli kapabla, redaktoro.

Adiaŭe salutas vin,

Paŭlo Hopkins.

PS. Eventualaj estontaj kontribuantoj al TT bv sendi siajn manuskriptojn al la ĝenerala sekretario/estrarano pri eldonaĵoj de TEJO: Norberto Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna, Italio.

#### NOVAJ ADRESOJ

Norvega Junularo Esperantista, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5.

Junularo Esperantista Kanada, pf.126, Stacio Beaubien, Montreal, Quebec, Kanado H2G 3C8.

=====  
Estimataj legantoj,

la ĝenerala sekretario/estrarano pri eldonaĵoj de TEJO, kiu kunmetas tiun ĉi numeron de TT, sentas la devon aldoni kelkajn liniojn al la supra mesaĝo de Paŭlo Hopkins, kiu forlasas la postenon, tre bone plenumitan en la pasinteco, de redaktoro de TT. La ĉefa rolo de TT estis, laŭ la intencoj de la Komitato en Leuven ('82), tiu de ligilo/forumo por la ekstereŭropaj membroj de TEJO. La ĉefa problemo de TT estis, evidente, la fakto ke tiuj membroj ne fakte uzis tiun ĉi rimedon: t.e., ĉiam mankis materialo. La situacio fariĝis pli kaj pli netolerebla, kaj Paŭlo venis al la decido rezigni pri sia redaktoreco, ankaŭ por ĉiujn respondeculojn meti antaŭ siajn respondecojn. Dum la IJK en Swanwick, oni diskutis longe pri la estonto de TT, venante al la konkludo ke ĝi estas ne malhavenda, kaj al la serĉado de anstataŭanto de Paŭlo. Kaj, bonŝance, oni trovis tiun homon. Ekde la unua numero de 1985, TT estos redaktita far ANDY KÜNZLI, Zumhofstr. 22, CH-6010 KRIENS (LU), Svislando. La ceterajn numerojn de 1984 redaktos la supre menciitaj funkciuloj de TEJO, kiuj kaptas la okazon por danki al Paŭlo Hopkins pri lia diligenta laboro farita ĝis nun.

Norberto Saletti

POR LA KOMITATO, SED NE NUR ! de Francisco Xavier Moleon, Hispanio

En mian kapon venis demando, kiun solvi mi provis, sed ne sukcesis. Jena estas la demando: Ĉu la Komitato de TEJO povas iel rifuzi komitatanon nomumitan de organizo membranta en TEJO? Pli klare: se organizo, landa aŭ faka, kiu apartenas al TEJO, nomumas reprezentanton (laŭ la Statuto, komitatano A), kiu estas lingve, movade aŭ alifake nekompetenta, ĉu ekzistas maniero, ke TEJO malkomitatanigu lin/sin? Mi faras ĉi demandon al la komitato, por ke ĝi respondu. Efektive, tia persono, nekompetenta pri ia fako, povas esti ne nur senutila, sed eĉ malutila. Imagu iun, kiu balbutas la lingvon kaj elektigis komitatano. Ĉu li ne brem-sus la laboron de la komitato? Por kio li taŭgas? La komitata-nojn B elektas la tuta komitato, kaj, ĉar ili devas paroli antaŭ ĝi, oni povas konstati ilian nivelon, ilian almenaŭ ioman sper-ton, ktp. Sed pri komitatanoj A la afero estas tute alia. La e-lektito povas esti genio, aŭ simple ludemulo, kiu ŝatas sin nomi "komitatano de TEJO", sed kiu ne scias, kio ĝi estas, nek ha-vas intereson informiĝi. Ĉu ne eblus, ke TEJO povus rifuzi kiel komitatanon reprezentanton nomumita de landa aŭ faka asocio? Tia eksigo okazu, tamen, kiam ekzistas vere forta kaj grava ki-alo: pruvita nekompetenco, malintereso, ktp. Kompreneble, TEJO informus skribe la koncernan organizon pri la eksigo de ties komitatano(j) kaj pri la kaŭzo, kaj la organizo rajtus elekti alian reprezentanton. Eble jam ekzistas tia proceduro. Se ne, estus bone krei ĝin. Sed ni ne restu nur ĉe la junulara sekvio. La samon mi konsilas al UEA.

JAPANIO de Hiroyuki USUI, Japanio.

Ha, mi ne supozis, ke io tia povus okazi. Kiam mi legis pri INSALA en TT, mi pensis, ke tia feliĉa afero ne okazos por japa-naj junuloj esperantistaj. Sed ja io tia okazis!! Mi estis stul-ta, forgesante pri Ĉinio, kies movado estas mirindaĵo en la mondo. Lastan aŭtunon Japanion vizitis la ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio HU Yaobang kaj promesis inviti trimil-personan japanan delegacion senpage al sia lando. Eksci-inte pri tio, Ĉina Esperanto-Ligo klopodis, por ke finfine Ĉina Junulara Federacio, ĉefa respondeculo Ĉin-flanka pri la afero, permesu, ke kvin japanaj esperantistaj junuloj aliĝu al la de-legacio. (Japana Esperanto-Instituto instigite de CEL petis tion al la federacio kaj laste venis oficiala decido.) La kondi-ĉo por la esperantistaj kandidatoj estas: ili havu malpli ol 26 jarojn kaj parolu sufiĉe bone la lingvon Esperanton. Tegmenta Komisiono de la japana movado (konsistigita de JEI, KLEG, RH kaj P EPA), kvar esperanto-organizaĵoj en Japanio, per eseeto elektos la sendotojn. La delegacio vizitos Ĉinion fine de septembro kaj komence de oktobro. Esperantistoj kompreneble kontaktos grupojn sur-loke.

Antaŭ ducent jaroj estis mia gepatra lingvo preskaŭ forigita el la mondo kaj la nacio germanigita pro religiaj kaj politikaj kaŭzoj. Sed junaj patriotoj tamen sukcesis renovigi la nacian literaturon kaj reĉefigi la nacion, kvankam tiutempe la eelo ŝajnis utopia kaj nereala. Unu el la nuntempaj verkistoj skribis: "La juna generacio de tiu tempo sukcesis fari miraklon: en Prago ne plu estis nur dek aŭ dudek personoj parolantaj la ĉeĥan, sed kvindek, cent, poste ducent, tricent... Ĉu vi scias tion imagi? Tio, kion ili entreprenis - la batalon por la savo de la nacio -, el la vidpunkto de la tiama mezkvalita homo estis fantazia kaj nenormala." Nun parolas ĉeĥe la tuta dekmiliona nacio kaj la lingvo estas bonege tralaborita ankaŭ en la literaturoj beletra kaj faka. Ni, esperantistoj, strebas fari similan miraklon, same utopian kaj nenormalan el la vidpunkto nuntempa. La iamaj ĉeĥaj patriotoj klopodas disvastigi sian lingvon, sed ankoraŭ pli: evoluigi ĝin al lingva perfekteco en ĉiuj tri stiloj (la komuniza, la beletra kaj la faka). Ili majstris la lingvon kaj superhomo laboris por ĝi, kvankam ne sen problemoj, kiujn kaŭzis la cenzuro, manko de mono, kvereloj kaj disputoj inter la patriotoj, personaj ambicioj, fiereco, vanteco kaj snobeco fuŝantaj la komunajn kunlaboron kaj amikecon - malgraŭ ĉi ĉio ili sukcesis, kaj por ni, iliaj pranepoj, estas preskaŭ nekredeble, ke tia batalo estis iam bezonata. Fine de nia scienca jarcento multaj esperantistoj, homoj dezirantaj influu la lingvan evoluon de la homaro, havas ofte nenian scion pri la lingvoscienco, kaj iliaj imagoj pri la venko de la Internacia Lingvo estas naivaj kaj malproksimaj de la realaj ebloj. Ili ne volas eĉ aŭdi pri la laboro farenda antaŭ la venko, tiom malpli fari ĝin: ke necesas evoluigi la lingvon ankaŭ en la faka stilo, kiu ĝis nun estas malkontentiga; ke necesas fondi normigan organizon, ĉar nenormigita fakterminaro ne estas fakterminaro; ke sen apliko en la scienco kaj tekniko neniu lingvo fariĝos internacia, ĉar neniu ŝtata ekonomio povas ekzisti sen scienc-teknika informado el eksterlando.; ke necesas prepari en ĉiuj lingvoj de la mondo E-lernilojn, kiuj peros al la interesitoj ne nur la fundamentojn de la lingvo, sed la lingvon en plena amplekso; ke la Internacia Lingvo ni ĉiuj devas lerni aktive kaj bonege, ĉar kiu verkos literaturon kaj gazetaron, kiam ne ekzistas Esperanta nacio kaj se esperantistoj lernus Esperanton nur pasive, kiel oni kutime lernas fremdajn lingvojn?; ke la mondo ne povas enkonduki la Internacian Lingvon antaŭ ol la laboroj estos plenumitaj; ke neniu ŝtataj kaj internaciaj institucioj faros la laboron anstataŭ ni, ĉar ili ne scias Esperanton; ke estas malprudente petegi de la institucioj ordonon plenumi la laboron, kvankam ni povas plenumi ĝin ankaŭ sen ordono; ktp., ktp., ktp. Estas tasko de la juna esperantista generacio enpaŝi en la novan jarcenton (kaj jarmilon) pli science, pli realisme, pli sinklerige, pli diligente, pli celkonscie. Ni devas komenci jam nun.

5-a STUDENTA ESPERANTISTA RENKONTIĜO de Gabor Vojniĉ, Jugoslavio.

La 5-a Studenta Esperantista Renkontiĝo, estis okazigita ĉijare en turista urbeto Palié (apud urbo Subotica) de 9. ĝis 11. de marto. La ĉeftemo estis "Kiel plifortigi studentan esperantistan movadon en Jugoslavio". La renkontiĝon partoprenis 60 personoj el 20 diversaj landoj. Ankaŭ ĉeestis Neven Kovaĉić, estrano de TEJO pri landa agado en ekstereŭropaj landoj, kaj Tibor Sekelj, monde konata verkisto, vojaĝanto kaj esperantisto. Laŭ la plejmulto de la partoprenantoj, la ĉi-jara S.E.R. estis plej bone organizita inter la ĝis nunaj. Oni havis abundajn kaj diversspecajn programojn. Inter ili estis tre interesa kvizo pri Esperanto, amuza vespero, vizito al la Ekonomia Fakultato en Subotica kaj al la komputiligita parto de la Instituto pri Informatiko, kaj altnivela teatraĵo en Esperanto kiun prezentis zagrebanoj, ktp. La ĉeftema diskuto estis okazigita sabate posttagmeze. Post la enkonduka referaĵo ekestis tre vigla debato kiu daŭris tri horojn. Dume estis decidita, ke oni devas organizi studentajn Esperanto-klubojn en ankoraŭ multaj lokoj, ĉar nuntempe nur kelkaj tiaj kluboj funkcias. Pluraj ĉeestantoj emfazis, ke se landnivele la esperantista junularo multe plivigliĝus, pli agus, tiam certe ankaŭ la studenta esperantista movado estus pli forta kaj amasa. Estis decidite, ke tiu ĉi lasta temo estu daŭrigita en iu baldaŭa landnivela renkontiĝo. Krome, ankaŭ la ekstera publika estis informita pri la renkontiĝo, ĉefe per afiŝoj kaj per la radio. Dume la loka radiostacio tiom interesiĝis pri Esperanto, ke post unu semajno en Radio Subotica estis duonhora programo pri Esperanto.

LETERO AL LA REDAKCIO de Pascual Llusera, Hispanio

Estimata Paŭlo,  
mi legis la kontribuon de Michael Lennartz en la lasta numero de TEJO-Tutmonde, kaj mi devas konfesi ke tute ne estas evidente al mi, ĉu li konsentas aŭ ne kun mia artikolo. Almenaŭ klare diriĝas tie -- kio jam estas signifa paŝo al realismo pli ol la ĝenerala movado pretas fari: -- ke ni ne nur "statistike" stagnas sed eĉ malantaŭeniras; ĉu tio signifas ke ni tamen "malstatistike" progresas (kion ajn tio signifus) ne estas klare.  
Se mi bone komprenis la artikolon de Michael, la Esperanta movado estas tri-cela. Unue, homoj en ĝi trovas amikecon kaj kontentiĝon. Pri tiu punkto mi absolute konsentas; mi eĉ diris, en mia artikolo, ke ĝi estas la plej grava aspekto. Ni tamen agnosku ke tia amikeco neniel estas unika al la esperanta movado; ĝi povas ekzisti en kiu ajn societo kies membroj posedas ion kiu distingas ilin de la cetera socio, kaj kiu sufiĉe malgrandas por ke homoj sentu sin hejme en ĝi. Nur en malgrandaj medioj ĝi povas ekzisti. "Fina venko", de Esperanto estos por ĝi kata-

strofa.

Due, li diras, Esperanto-parolantoj funkcias kiel kvazaŭa laborgrupo de lingvistoj, kiuj kolektas kaj recenzas faktojn pri lingva komunikado. Se tio estas la celo de la movado, ĝi estas rimarkinde malbone kvalifita por tiu tasko. Ne nur la granda plejmulto de la membroj havas nenian scion, formalan aŭ praktikan, pri lingvistiko, sed la movado ekde la komenco pruvis, ke ĝi estas senespere antaŭjuĝinta favore al specifa solvo. Ni ne petas klerikojn fari studojn pri religiologio: kial esperantistoj verku raporton pri komunikado?

Kaj tial, Michael diras ke Esperanto-parolantoj nun evoluigas la semon kiu eventuale fariĝos internacia lingvo. Konsiderante la fundan lingvan konservatismon de plejmultaj esperantistoj -- mi konsentas kun Laŭrenco Septje' kiam li riproĉas, en la lasta Kancerkliniko, ke recenzistoj, ekzemple, preferas verki pri preseraroj ol pri vere kreismaj aspektoj -- mi apenaŭ vidas kiel oni povas esperi ke ili iel ajn pretu lerni de siaj eraroj. Esperanto ankoraŭ havas akuzativon, dum multaj naciaj lingvoj jam abolis tiun absurdaĵon. Kaj ili ankoraŭ ne lernis la plej fundamentan lecionon: internacia lingvo estas lingvo parolata vaste kaj mondscale. Eĉ la latina superas Esperanton el tiu vidpunkto.

La esenca problemo de la movado estas, ke ĝi rifuzas agnoski ke ĝiaj oficialaj celoj estas absolute eksaj kaj nerealegeblaj. Ni daŭre referencas al "grandiozaj sukcesoj" kiel kontaktoj kun UNESKO kaj MFDJ, kvankam la helpo kiun ni ricevis el tiuj sukcesoj estas nula. (Ja tamen: ili helpas nin konvinkiĝi ke ni estas gravuloj.) Esperanto ne nun estas, kaj neniam estos, internacia lingvo. Pretendante la malon, ni malhelpas nur nin mem.

FRAŬLINO IJK de Sandor Hideg, Hungario.

La ideo ne venis de LKK de IJK, sed de Amri Wandel (ĵuseksa prezidanto de TEJO, noto de la redaktoro). LKK nur pensis kial ne, des pli, ĉar simila afero jam okazis antaŭe, se mi bone memoras, lastfoje en 1978 en Veliko Tirnovo.

Tial LKK pretigis programplanon de IJK, kiun la estraro akceptis, kio signifas, ke ankaŭ ili volis tiun programon. Cetere ankaŭ LKK emis aranĝi ĝin por ne kontraŭstari iaman tradicion, kaj antaŭvidebli bonhumura programero. Kaj ĝi estis vere bonhumura. Elektro fine ne okazis, sed ĉiuj bone fartis, travivis ion komunan, diskuton, kontraŭstaron, opiniesprimon. oni ne estis pasivaj spektantoj de la programo, sed partoprenantoj.

La ideo mem. LKK ne volis diskriminacii virinojn, eĉ oni povus diskuti pri tio, ĉu tiu elektado estas diskriminacio, aŭ ne. Vere mankis elektro de Fraŭlo IJK, sed por marĉandi pri tiuj aferoj LKK ne havis tempon diskuti duonjaron nur pri tio.

Ĉu estas bezonata junulara sekcio de KVA (Komisiono Virina Agado)? Mi konscias, ke estas komunaj interesoĵ de virinoj, kion devas defendi. Ankaŭ mi mem pretas tion fari, tamen mi ne volas komisionon pri tio. Mi dubas ĉu la junaj virinoj havas multe malsamajn interesojn ol ĉiuj virinoj, por fondi apartan komisionon. Se tamen jes, ili des pli havas malsaman intereson ankaŭ laŭ lando, laboro, religio, ktp. Kaj ĉu por ili ĉiuj apartan komisionon?

Foje diris Frigyes Karinty (fridjeŝ karinti) - iama prezidanto de Hungara Esperanto-Societo (aŭ iu simila), cetere konata verkisto - kiam oni fondis Packomisionon: "Se nun ni fondas komisionon pri paco, kaj aliĝas ĉiuj esperantistoj, tiam ni simple deklaru la tutan movadon Esperanto-Pacmovado. Se ne aliĝos ĉiuj, ili baldaŭ fondos Malpacan Komisionon." Do, ĉu fondi ankaŭ KVA (Komisiono pri VIRA agado)? Jam estus bona temo pri diskuti kiel distingi viran kaj inan KVA.

Koncize: laŭ mi pri sekso kaj egaleco eblas kaj devas diskuti, sed ne necesas fondi komisionon pri tio. Kio okazus, se ni havus komisionon pri ĉiu temo?


#### ESPERANTO EN LA PROJEKTO 'UNISPACE' de Amri Wandel, Israelo/Usono.

UNISPACE estas mikrokomputila eduka sistemo, kiu simuladas internacian komunikadon kaj trejnas gejunulojn analizi problemojn kaj fari decidojn. La sistemo traktos diversajn temojn de la moderna mondo rilatantajn al ekonomio, internaciaj rilatoj kaj spacnavigado. Unu el la celoj de la programo estas simuladi internacian komunikadon kaj la problemojn de plurlingveco kaj tradukado, kaj tie estas la loko kie eniros esperanto. La laborlingvo de la sistemo (tio estas, de la gvidanta teamo en la centro en Vieno) estos la angla, sed la uzanto-direktita komunikativa lingvo estos esperanto. Kion signifas tio? Uzantoj povos "paroli" al la sistemo (tio estas, tajpi en la komputilon) per sia gepatra lingvo. La instrukcioj kaj kontribuoj estos tradukitaj en Esperanton far loka esperantisto, kiu kunlaboros tiucele en la regiona centro. La tradukita mesaĝo aŭ datumo estos sendita al la centro, kie ĝi estos retradukita en la anglan, pri laborita de la sistemo kaj resendita, ankaŭ post traduko. Tiu procedo ne estos tiom komplika kiel ĝi aspektas, sed la neceso de dufoja tradukado malrapidigos la ricevon de reagoj de la sistemo kaj enkondukos malprecizajojn, tiel emfazante la problemon de interlingva komunikado. Por eviti la bezonon de tradukado, la uzantoj povos komuniki kun la sistemo rekte en la laborlingvo, tio estas la angla, kaj probable pluraj uzantoj ja uzos tiun eblecon, sed la sistemo kuraĝigos la uzantojn uzi la komunikado-lingvon, tio estas, Esperanton. Kiel? Unue, la traduko en Esperanton kaj el ĝi en la centro estos tre rapida kaj efika (malsame al la traduko en la branĉo) kaj uzanto kiu kontaktos la sistemon per

Esperanto ricevos do same efikan kaj rapidan reagon kiel per la angla.

Due, la sistemo prezentos Esperanton kiel la estonta komuna komunikilo, kaj ofertas al la uzantoj mem-instruan programon de Esperanto, kiun ili povos apliki laŭplaĉe, kaj ĝis la dezirata nivelo (ekzemple, por simplaj instrukcioj ne necesos multa studado, sed por povi konversacii la uzanto estos allogata progresi plu).

Trie, ekzistos ankaŭ ebleco al uzantoj utiligi la sistemon por kontakti aliajn uzantojn en aliaj landoj, kaj ekzistos speciale dediĉita tempo por tia libera "babila" komunikado. Tamen, la libera komunikado, kiu nature estos tre ŝatata kaj privilegia, eblos NUR per la komuniko-lingvo, Esperanto. Tio estos forta motivigo por la gejunuloj apliki la lingvo-instru-programon por lerni la komuniko-lingvon laŭ ilia bezono - kaj konscio pri la bezono de inter-lingva komunikilo estos parto de la eduka celo de UNISPACE.



JER '84 EN HUNGARIO de László Szilvási, Hungario.

Pli ol 300 partoprenantoj...

Kvankam la printempo ankoraŭ ne tute alvenis, tamen -almenaŭ por tri tagoj - "verdiĝis" la "Fama urbo" Kecskémet en Hungario. Tie ĉi ja okazis la tradicia Junulara Esperanto-Renkonto, organizita de Junulara Komisiono de HEA (HEJ), kaj de la Departementa E-Komitato en Bács-Kiskun, kaj ĝin partoprenis ĉ. 340 gejunuloj ĉefe el Hungario, sed alvenis gastoj el Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, GDR. Kongrue kun la klopodoj de HEJ, la proporcio de eksterlandanoj denove estis pli alta ol en la antaŭaj jaroj, kaj ĉi jare ĝi estis preskaŭ unu triono. (Tamen oni devas noti, ke la 50-persona grupo, sendita de Internacia E-Kursejo en Bulgario, denove konsistis ĉefe el krokodiloj...)

En la unua tago por la jam alvenintoj okazis urborigardado, vizito al Planetario, konkurso pri ĵurnalvendado (temas pri vendado de hungarlingva "povesperanta" magazeno Mondo kaj Lingvo), tre bone sukcesinta, gaja, luda konkurso gvidita far Agi ABAI, solena malfermo, folk orprogramo, kaj vespere oni povis ĝui la kantrimuzikon de la ĉeĥa ensemblo "BARBULOJ".



En la sekva tago antaŭtagmeze oni povis aŭskulti diversajn prelegojn, okazis pluraj sekci-kunsidoj. La posttagmezo estis libera. Vespere denove kolektiĝis ĉiuj, spektis prezentojn de debrecena studenta teatro, ĝuis desegnofilmojn, dancis, eĉ konkursis pri "rock-and-roll". Plej da atento altiris al si la ilustritaj rakontoj pri la pasintjara IJK en Debrecen, far Ági ABAI, kaj pri la japana studenta vivo, far Gábor MÁRKUS. Pro la granda sukceso estas ankaŭ menciinda la gaja konkurso pri Esperanto, gvidita de Csaba LENDVAY. Nokte estis "nur" fakultativaj programeroj. Multaj aŭskultis preskaŭ ĝismatene la muzikon de "Barbuloj" (kiuj fakte estas barbuloj), aŭ faris sociajn ludojn.

Dimanĉe matene okazis pac-kunsido, prezidita far d-ro László DOBOS, la alta protektanto de JER'84, prezidanto de la Dep. Komitato de Patriota Popolfronto. La solenan ĉefparolon faris d-ro LOVASSY, reprezentanto de la Landa Pac-Konsilio, kaj estis laŭtlegita la mesaĝo de d-ro Imre PETHES, prezidanto de MEM, destinita al la partoprenantoj de JER'84 en Kecskemét. Antaŭ la kunsido oni povis ĝui la publikan, preskaŭ 10-minutan "koncerton" (enhavanta ankaŭ la E-himnon) de la fama urba sonorilaro, kaj post la kunsido la ĉeestantoj plantis la "arbon de paco" en la urbocentro.

Ŝajnas al mi, ke la junulara movado - post 3-4-jara kuntiriĝo - denove vigligas, kaj pliamasiĝas. Pravas tion la faktoj, ke malgraŭ la ekonomikaj malfacilaĵoj alvenis ĉ. 340 gejunuloj (pasintjare entute 210!), kaj estis pli kaj pliiganta la esperantista karaktero de la Renkonto. Dum JER'84 faris A-ekzamenon pri Esperanto 16 gejunuloj, kaj en la kadro de tiu ĉi aranĝaĵo estis organizita la lingvokonkurso pri Esperanto por mezlernejanoj. Dum JER estis ĵugitaj honoraj diplomoj pro la fervora kaj rezulta esperanto-agado al la jenaj junuloj-esperantistoj:

József MADARAS	-Budapest
Edit KLEIN	-Zánka
Andrea KERÉKES	-Várpalota
András FEHÉR	-Budapest.

Mi estas konvinkiĝinta, ke la kontaktoj, establita dum la organizado de JER, plifaciligas la agadon de la lokaj esperantistoj en la urbo, kaj ke la partoprenintoj forveturis kun la impresoj: Jes, tiu ĉi JER estis bone sukcesinta, kaj ni nepre renkontiĝos ankaŭ sekvajare.

AL ESPERANTISTOJ DE LA TUTA MONDO de Charles Chareille, Francio.

La asocio tiel nomita "La muelejo de la metilernantoj" (Le Moulin des apprentis) arigas ĉiujare gejunulojn por kune klopodi je la restarigo de malnovaj muelejoj, tiam konstruante monumenton por la paco kaj por l'amikeco.

Dum la dumonata periodo -julio kaj aŭgusto- kiam la gejunuloj amase partoprenas en tiaj laboroj, la asocio provas paroli al ili pri Esperanto, kaj lernigi al ili ĉi tiun belan lingvon, konsiderante ke ĝi ankaŭ ebligas krei pacon kaj amikan etoson. Pasintan jaron venis aktivaj esperantistoj. Ili laboris kune kun la gejunuloj kaj organizis Esperanto-kursojn en kiuj partoprenis komencintoj. Dum la venonta somero ni dezirus ree eksperimenti tian instruadon. Tial, ni lanĉas alvokon al ĉiuj esperantistoj, kiuj povas partopreni en niaj aktivajoj kaj samtempe gvidi kurson. Ni proponas gastigi du propravolajn kursogvidantojn ĉu duonmonate, ĉu monate, laŭ deziroj. Vinturnu al George MAZAUD, 322 Avenue de la Châtre, 36000 CHATEAURoux, Francio.

### JUNULOJ KAJ LA KRIZO EN EUROPO

Ĉu ankaŭ vi estas grumblulo, kiu ĉiam pledas pri la kreskanta senlaboreco? Ĉu ankaŭ viaj konfuzitaj oreloj ĉiam kaj ĉia aŭdas tiujn multpromesajn rimedojn? Ĉu vi ne trovas laboron aŭ ĉu vi perdis ĝin? Ĉu vi studas sen perspektivoj?

Ĉiuokaze, oni sendube iusence seniluziigis vin tiurilate jam dum monatoj (jaroj?) kaj en vi ardas la deziro konigi viajn vunditajn sentojn kaj aliflanke viajn pozitivajn sed ĝis nun malaprobatajn proponojn, per kiuj vi solvos la problemon. Felice, ni antaŭvidis vian maltrankviligan situacion kaj tial, speciale por vi, ni inventis nepre ekskluzivan programon. Venu do al la FLEJA-JEB semajnfino en De Pinte (Belgio) inter la 2a kaj 4a de novembro 1984. Informojn petu al: Ilse JACQUES, Molenstraat 29, B-2018 ANTWERPEN.

### 28a INTERNACIA SEMINARIO

La 28a IS de GEJ (kaj GEA) okazos ĉijare en Wetzlar, meze de FRGermanio, kun la temo 'Japanio'. Kadre de la IS oni priparolos la plurajn aspektojn de la japana kulturo: literaturo, socio, historio, religioj, ekonomio, arto, lingvo, ĉiutaga vivo estos temoj de xprelegoj; eblos praktiki japanajn manlaborojn, kuirarton, kaligrafion, popoldancojn; okazos lingvokurso pri la japana. Informojn petu ĉe Germana Esperanto-Junularo, Postfach 101422, D-2000 Hamburg 1, FRGermanio.

### NOVA LANDA SEKCIO DE TEJO

La Komitato de TEJO, kunsidante dum la 40a IJK en Swanwick, Britio, meze de julio, akceptis per aplaŭdo novan Landan Sekcion en TEJO. Temas pri la JUNULARO ESPERANTISTA SVISLANDA, kies ĉefa kontaktaĉreso estas Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Bonvenon kaj bonan laboron al ili.

## 17a PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

Inter la fino de aŭgusto kaj la komenco de septembro okazos en Jugoslavio, pli precize en Zagrebo kaj Velika Gorica, la 17a PIF. La programo antaŭvidas kelkdek da teatraj prezentoj far pluraj ensembloj el 11 landoj de la mondo. Informojn ĉe Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

## KOMUNA SEMINARIO

Jam por la tria sinsekva jaro okazis la Komuna Seminario de junaj esperantistoj el Koreujo kaj Japanio. Ĉi jare ĝi okazis en Ĉonan, ĉe Seulo, en Koreujo, kun la temo "Junulo kaj Kulturo", komence de aŭgusto.

## ESPERO ENTERPRISES IMPORT-EXPORT

Tiu estas la nomo de entrepreno en Hongkongo kiu cirkuleris al pluraj junularaj organizoj informante pri la aĉetebleco de ŝlosilringoj kun Esperanto-simbolo; kosto de 50 pecoj estas 30 usonaj dolaroj, kiuj inkluzivas sendokostojn per registrita aerpoŝto. Kaze de mendo de pli ol 500 pecoj, 10% rabato riceveblas. Informojn kaj mendojn petu de 'Espero Enterprises Import-Export', GPO Box 11992, Hong Kong.

## PACMONUMENTO

En 1977, en la aŭstria urbo St.Ulrich ĉe Steyr, la komunuma konsilantaro decidis starigi pacmonumenton de la tutmonda junularo. Ĉiuj junularaj asocioj de la mondo estas invitataj sendi brikon al la vilaĝo, por konstrui la monumenton; pluraj junularaj asocioj jam tion faris, aliaj, kiel TEJO, interesiĝas pri tio. Interesiĝantoj sendu brikon al Hans Zeller, Schlüsselhofgasse 25, A-4400 Steyr, Aŭstrio.

## 'LINGVAJ SITUACIOJ'

En 1983 la estraro de TEJO ricevis interkonsento-proponon de Asocio de Sovetaj Esperantistoj pri la priskribado de lingvaj situacioj laŭ unueca formo pere de Esperanto, en pluraj lingvoj; la unuaj tiaj situacioj aperis jam fine de 1983 en la "Informa Bulteno" de ASE, kaj aliaj aperis komence de 1984. La situacioj prezentas ampleksan superrigardon sur la diversaj okazaĵoj, kaj estas redaktitaj en maniero doni kiel eble plej kompletan bildon pri la gramatiko kaj strukturo de la lingvoj. Sufiĉas traduki en la etnajn lingvojn la situaciojn, por havi bona komparbazon inter la lingvoj. Informojn ĉe la ASE-Litova Filio, SU-232600 Vilnius, Kosciuskos 36, Sovetunio.

## NACILINGVAJ INFORMILOJ APERONTAJ

Jam de iom da tempo, TEJO kolektas tradukojn, en iom da lingvoj, de la originale anglalingva informilo/varbilo "Esperanto: what's that?". Respondis la peton de la CO pluraj LSj de TEJO, kaj la estraro esploris pri preseblecoj ĉe kelkaj instancoj. En Swanwick la estraranoj pri eldonadoj kaj landa agado findiskutis la proponojn kaj, post la decido finesplori ĉe du presejoj en Eŭropo, decidis definitive starti la tuton. La nacilingvaj informiloj aperos komence de 1985, plej malfrue, en la sekvaj lingvoj: angla (represo), hispana (represo), portugala, itala, franca, rusa, konga, lingala, ĉeĥa; ekzistas esploroj rilate tradukojn en la araban, rumanan kaj sùahilan lingvojn. Intersigantoj petu informojn ĉe Norberto Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna, Italio.

## LASTAJ NOTOJ

Tiu ĉi numero de TT estis kunmetita de N.Saletti surbaze de materialo liverita de Paŭlo S.Hopkins, kaj de alia materialo je dispono de la kunmetinto. Venonta numero, aperonta ĝustatempe komence de oktobro, enhavos raportojn pri la IJK en Swanwick kaj pri la UK en Vancouver, krom ĝeneralaj artikoloj pri la TEJO-agado: tiun numeron kunredaktos kelkaj estraranoj de TEJO. La posta numero, aperonta en decembro, estos kunredaktita de N.Saletti kaj de la nova redaktoro, Andy Künzli, kiu memstare redaktos la revuon ekde januaro. Ni petas ke tiuj, kiuj intencas kunlabori en la redaktado de la venontaj numero, kontribuante per artikoloj aŭ/kaj alia materialo, tiun materialon sendu al la nova redaktoro (adreso ĉi sube).

# Andy Künzli

Zumhofstraße 22

CH · 6010 KRIENS LU

SVISLANDO

